

La Brita Esperantisto

Julio-Aŭgusto 1986



Jen kelkaj el tiuj, kiuj ĉeestis la unu-tagan kurson en Bangor pasintan marton. Ne estas tro frue jam nun aranĝi similajn kursojn por la Jubilea Jaro.

La

Brita Esperantisto

THE BRITISH ESPERANTIST

ELDONAĴO DE ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO

82A Jaro, N-Ro8 71

Julio-Aŭgusto 1986

Eldonas:

ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO, 140 Holland Park Avenue, LONDON
W11 4UF. Tel. 01-727-7821

Redaktoro:

WILLIAM AULD

20 Harviestoun Road, DOLLAR, Skotlando FK14 7HG

Reklamoj: £20 por tuta paĝo, kaj samtarife (plus 15%) ĝis okona paĝo. Unu senpaga el tri.

Nek la Asocio nek la Redaktoro respondecas pri la personaj opinioj esprimitaj de kontribuintoj al la revuo, kondiĉe ke la esprimoj ne estas kontraŭleĝaj.

UK ISSN 0007-067X

La jara kotizo por EAB – aliĝu en iu ajn monato – estas £10.00 (£6.00 se malpli ol dek-ok-jara). Anoj ricevas la du gazetojn 'Esperanto News' kaj 'La Brita Esperantisto'. Abono nur al "La Brita Esperantisto" estas £5.00 jare sen aneco.

Perpoŝtaj korespondaj kursoj estas haveblaj en stadioj I, II, 'intensive' kaj Altgrada, ankaŭ ekzamenoj. Petu detalojn kaj prezojn ĉe Esperanto Centre, 140 Holland Park Ave., London W11 4UF – kun afrankita mezgranda koverto.

Form of Bequest

I give and bequeath (free of duty) to Esperanto-Asocio de Britujo whose present address is 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, the sum of £..... to be used for the general purposes of such Association. And I direct that the receipt of the Secretary for the time being of the Association shall be a sufficient discharge to my Trustees for such a legacy.

Kio estas la ĝusta nomo de la planlingvo de d-ro Zamenhof?

Bernard Golden

Lastatempe estiĝis demando pri la ĝusta aŭ oficiala nomo de lingvo vaste konata dum jardekoj kiel Esperanto. La demando estas respondebla, aŭ almenaŭ serioze pritraktebla, nur en historia perspektivo. Estas necese rigardi la problemon laŭ du vidpunktoj: (1) tiu de la aŭtoro de la lingvo; (2) tiu de la uzantoj kaj ankaŭ neuzantoj, kiuj parolas kaj skribas pri la lingvo. La unua paŝo estas dokumenti la zamenhofan nomenklaturon surbaze de liaj propraj verkoj kaj publikaĵoj.

1. *Lingvo uniwersala*. Tiu ĉi nomo datiĝas de la jaro 1878, kiam en la monato decembro la 19-jara gimnaziano debutigis sian unuan praesperantan lingvon. La litero *w* en tiu nomo estas prononcata kiel “v”. El tiu lingvo universala restas hodiaŭ nur kvarlinia poemo.

2. *Lingvo universala*. Post mallonga restado ĉe la Universitato de Moskvo, Zamenhof revenis al Varsovio kaj, trovinte detruitaj la manuskriptojn pri *lingwe uniwersala*, li komencis reverki sian lingvon en la periodo 1881-1882. La titolo de la dua praesperanta manuskripto, de kiu ni havas kopion, tekstas: *Lingvo universala f.e. grammatiko e verbio laul trema ridakco del anno 1881* (Lingvo universala t.e. grammatiko kaj vortaro laŭ la lasta redakto de la jaro 1881). Rimarku, ke en la kolekto da tekstoj en praesperanto ne troviĝas la vorto “internacia”.

3. *Lingvo internacia*. La esprimo “lingvo internacia” aperas la unuan fojon okaze de publikigo de la t.n. Unua Libro, unue en la rusa teksto kaj poste en aliaj tradukaĵoj. La Esperanta versio de la titolpaĝo de la rusa eldono enhavas la vortojn “internacia lingvo” laŭ la rusa ordo. En aliaj lingvoj la etnolingvaj titoloj estas ekvivalentaj al “lingvo internacia” (en la pola kaj franca) kaj al “internacia lingvo” (en la

germana, angla kaj sveda). Estas du esceptoj; la unua angla versio (1888) estis nomata *international tongue* (*tongue* = lingvo kaj lango) kaj la jida traduko (1889) havas la vorton *Velt-ŝprache* (mondlingvo). Kvankam la vorto “universala” ne aperas en iu titolo, ĝi estas uzata en la titolpaĝa devizo “por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia”. Nur la angla traduko havas esprimon identan al la titolo de la libro, *international tongue*; en la aliaj lingvoj la adjektivo uzata en la devizo ne estas la sama kiel tiu de la titolo. La signifoj estas aŭ “mondlingvo” aŭ “universala lingvo”!

4. *Esperanto*. Ĉiuj Unuaj Libroj havis kiel la nomon de la aŭtoro la pseŭdonimon “D-ro Esperanto”. En *Nomaro de l' verkoj pri la lingvo internacia (Esperanta)*, kiu eliris ĝis *Januaro 1889* la vorto “Esperanta” estas uzata interkrampe kun la esprimo “lingvo internacia”. En postaj *Nomaroj* la adjektivo “Esperanta” aperas sen krampoj, kaj post kelkaj librotitoloj la vortoj “verkita en la lingvo Esperanto” anstataŭas “internacie”. Ankaŭ en 1889 estis eldonitaj la unua publikaĵo, en kies titolo aperas “Esperanto” kiel lingvonomo. La rusa titolo tekstas: *Polnij slovar' esperantskago (mjejdunarodnago) jazika. Ĉast' russko-esperantskaja*. Tie ĉi inter krampoj estas la rusa vorto signifanta “internacia”. Rimarku, ke en la subtitolo en Esperanto, *Plena vortaro rusa-internacia*, “internacia” estas uzata anstataŭ “Esperanto” kiel en la rusa. La nomo de la aŭtoro ankoraŭ estas d-ro Esperanto. En aliaj libroj eldonitaj en la sama jaro, la vera nomo de la aŭtoro aperas kiel la eldonisto, literita Zamengof laŭ la kirila azbuko, Samenhof laŭ la germana ortografio aŭ fonetike kiel Zamenhof. La titolo de la Esperanta-germana meza vortaro estas *Worterbuch der internationalen Esperanto-*

Sprache, international-deutscher Teil. Nun "Esperanto" rolas kiel substantivo. Simila titolo estas *Antaŭparolo al la vortaro de la lingvo "Esperanto"*. Akordas ankaŭ la rusa subtitolo, en kiu estas *jazika "Esperanto"*. Ankoraŭ unu ekzemplo estas la titolo de la unua adresaro (1889): *Adresaro de la personoj kiuj lernis la lingvon "Esperanto"*. Sur la titolpaĝo estas ankaŭ la rusaj vortoj *jazik' "Esperanto"* Ŝajnas, do, ke en 1889 Zamenhof ekuzis "Esperanto", kiel la nomon de sia planlingvo.

5. *Universala lingvo.* Por iu nekonata kialo, la esprimo "universala lingvo" denove aperas en librotitoloj. En 1890 Zamenhof eldonis *Vsemirni jazik Esperanto* (Universala (aŭ tutmonda) lingvo Esperanto). Geoghegan tradukis ĝin anglan kiel *The Universal Language Esperanto*, la dua eldono de la franca traduko farita de L. de Beaufront titoliĝas *Langue universelle esperanto*, kaj la portugala versio de J. H. Ferreira nomiĝas *A lingua universal "Esperanto"*.

En 1893 Zamenhof denove uzis la terminon "internacia lingvo" en kelkaj titoloj, sed en postaj jaroj "Esperanto" kiel memstara lingvonomo dominis.

"Internacia lingvo" (aŭ "lingvo internacia") neniel povas esti agnoskita kiel la oficiala nomo de la lingvo de Zamenhof. Krom la verkoj de Zamenhof, mi ekzamenis plurdekojn da titoloj de aliaj publikigaĵoj pri la planlingvistiko kaj mi trovis, ke "universala lingvo" kaj "internacia lingvo" estis uzataj sinonime en la 19-a jc. kaj ankaŭ hodiaŭ. Jen okulfrapa ekzemplo. Kiam Louis Couturat kaj Léopold Leau eldonis sian unuan historion de planlingvoj en 1903, ili titolis la libron *Histoire de la Langue Universelle*. Kvar jarojn poste ĝia suplemento havis la nomon *Les Nouvelles Langues Internationales*. Ne estas eble klarigi, kial okazis la ŝanĝo de "universala" al "internacia". Se oni komparas germanlingvajn titolojn, oni trovas, ke la preferata termino estas *Weltsprache* (mondlingvo). Plej verŝa-

jne la elekto de termino dependas de kapricoj de aŭtoroj kaj eldonistoj.

"Esperanto", do, estas la sola konvena nomo por la planlingvo de d-ro Zamenhof. La kialoj estas la sekvaj: (1) ĝi estas mallonga kaj pli facile pluformebla ol "internacia lingvo"; (2) ĝi estas neambigua, do malhelpas konfuzon kun aliaj internaciaj lingvoj; (3) ĝi antaŭ longe firme enradikiĝis pro la tradicia uzo de la aŭtoro mem kaj la uzantoj de la lingvo; (4) pro sia signifo ĝi karakterizas la personecon de d-ro Zamenhof kaj la spiriton de la Esperanto-movado. La nomoj de aliaj planlingvoj odoras ja mucideco, sekeco, senviveco: Volapuko, Ido, Occidental, kaj ankaŭ la plej freŝe bakitaj Anglo-Lat, Romanid, Vikto. Kontraŭe, malantaŭ la poezie elvokiva nomo Esperanto staras vivantaj, agantaj, pensantaj homoj. Ĝi do estas unika fenomeno, kaj pro tio mi opinias, ke estas konsilinde kontraŭstari al provoj anstataŭigi la nomon Esperanto, per klasifika termino kiel "internacia lingvo" aŭ eĉ pli riproĉinde per frida mallongigo – I.L. – aŭ enigma siglo – Ilo.

SPLENSPLENE

Drivas tra terenoj vastaj
terpomflok-saketoj plastaj

flusas tajdo senkontrola
limonad' kaj koka-kola

interflustras komputiloj
pri la homaj senutiloj

televido vekas vibrojn
ĉu vi plu memoras . . . librojn

tre prosperas la fatrasoj
fikonfliktoj inter rasoj

sankta petro hekatomboj
sed en nordirlando bomboj

ho ni vivas tre kontente
preskaŭ-fine-de-jarcente

W. Auld

DU PIONIROJ DE ESPERANTO EN NOTTINGHAM.

GEORGE OSBORNE CRAWLEY, 1875-1963.

CLAUDE EDWIN MEAKIN, 1897-1985.

Ambaŭ atingis la aĝon de 88 jaroj; sed en malsamaj epokoj.

Antaŭ la dua mondmilito mi unue renkontis George Crawley, alta homo kiu ĉiam portis la verdan stelon; sed nur post tiu milito mi vere konis lin. Mi mem aliĝis al la movado en 1929; sed ne memoras lin en kunvenoj.

Li rakontis al mi pri sia renkontigo kun D-ro Zamenhof ĉe Antverpeno dum la sepa Universala Kongreso en 1911. Tiam li estis Kapitano en la *Boy's Brigade* en Radford, Nottingham. (Por fremduloj, la *Boy's Brigade* estas junula organizaĵo kuntempa kun kaj iom konkurenca kun la Skoltoj.)

Grupon el tiu organizaĵo li gvidis al Antverpeno por la kongreso. Unu el tiu grupo estis Claude Meakin.

George Crawley estis meĥanikisto por la firmao Burroughs, fabrikantoj de kalkulmaŝinoj. Tiu firmao vendis maŝinojn al la gasfabriko en Torino, kaj sendis Georgon por pritrakti la maŝinojn kaj instrui la uzontojn. Tie li renkontis Esperantiston, kun kiu li povis komuniki, kaj kiu siavice povis pasigi la instruon al kunlaborantoj. Dume, George lernis ankaŭ la Italian.

Mi havas lian Diplomon, aljuĝitan al li de la Cattedra Italiana di Esperanto en Milano, 3an de Majo, 1914. Mi ankaŭ havas lian vortaron de Millidge, 1912 eldono, dediĉitan al li per la vortoj:

“Vojaĝu en mondpartoia, Vin bonvenigos amikar’ La Patrolando mia, via, Troviĝas ĉe la Esperantistar’”. “Donacita al S-ro Crawley de kelkaj geamikoj el la Nottingham Esperanto Societo, Janro, 1913. La manskribo estas belega.

En 1911 li loĝis en Radford, poste en Wollaton Park kie mortis lia unua edzino. Li reedziĝis, kaj transmoviĝis al la Meadows-kvartalo en Nottingham.

Poste al Sutton-Granby kaj Bottesford. Pro la pliigo de la kosto de busveturoj li reiris al la Meadows, kie li mortis.

Oni enterigis lin en la preĝejo korto de St. Peter, Radford. La vidvino de la dua edziĝo moviĝis de lok-al-loko en la Meadows; sed pro parta memorperdo nun troviĝas en la ĝeriatra fako de la Universitata Hospitalo en Nottingham, en la aĝo de okdekdu jaroj.

George Crawley iam sciigis min ke li restis en Italujo ĝis 1915, kiu estas la jaro, en kiu Italujo eniris la unuan militon, flanke de Britujo kaj Francujo. Kion faris Georgo dum la cetero de tiu milito mi ne scias; sed ke li vaste vagis en Eŭropo post tiu milito montras lia rimarkinda kolekto de urĝmono de la postmilita epoko de inflacio. Troviĝas en ĝi Germana mono de milionaj da Markoj; eldonaĵoj de diversaj urboj kaj vilaĝoj en Aŭstrujo: Hungaraj notoj de la komenco de Hungara sendependeco de Aŭstrujo: Polaj Notoj; Rusaj, Italaj; Francaj de civitoj; Nederlandaj kaj Belgaj notoj. Aparte vidindaj estas la internaj notoj de militaj malliberejoj Britaj kaj Germanaj. Mi ne trovis en la kolekto ion el la frua Ĉeĥoslovakujo.

Ankaŭ en ĝi troviĝas eroj el la dua milito.

Bone memoras Georgon Ralph Baxter, kiu unue renkontis lin en 1937, kiam Britujo komencis rearmi sin, prete por la dua milito. Ambaŭ komencis labori en la kanonfabriko en Nottingham, kie Georgo estis inspektisto de la produktaĵoj, por kontroli la kvaliton kaj taŭgecon.

Laŭ lia postrestanta vidvino de lia dua edziĝo, dum la dua milito li instruis Esperanton al soldatoj de diversaj nacioj, kiujn kunvenigis la milito, por ke ili povu reciproke kompreni unu la alian.

Rimarkindan anekdoton pri George Crawley rakontis al mi Ralph Baxter. Unu matenon en la kamparo li pafis kvindek kolombojn, el kiuj li donis ses al Georgo, por pasteĉoj. Semajnojn poste li rimarkis en la ĝardeno de

Georgo tre rikoltindan kreskon de pizoj. Li demandis al Georgo, de kie li havigis la semojn por tia bona rikolto. Georgo respondis, ke el la kropoj de la donacitaj kolomboj!

Tamen, Ralph ankoraŭ opinias, ke George estis bona inspektisto!

Claude Meakin estis membro de la Nottingham Societo dum multaj jaroj ĝis la morto. Li ĉiam frue antaŭpagis sian kotizon; sed ne ĉeestis la kunvenojn. La sola okazo kiam la lastatempaj membroj de la societo vidis lin estis dum unu el la jaraj vizitoj al Nottingham urbdomo, kiam lin ricevis, kun ni ceteraj, la tiama Lordurbestro de Nottingham, Konsilanto Dennis Birkinshaw, la 20an de Februaro, 1980. Li tamen restis nia plej malnova kaj maljuna membro, ĝis lia morto, 19an de Februaro, 1985. La restantaj plej maljunaj membroj, S-ino McDonald kaj S-ro Fillingham, reprezentis la Societon ĉe la entombigo ĉe la preĝejo de Sta. Helen, ĉe Burton Joyce, la 25an de Februaro, 1985.

Post la entombigo, S-ino Meakin traserĉis la librojn de sia edzo, kaj inter ili trovis lian ekzempleron de la Kongreslibro de la Sepa Kongreso en Antverpeno en 1911, kaj sendis ĝin al mi.

Ĝi estas bonformata libro de proks. 200 paĝoj, el kiuj mankas la unuaj dek. La sekvaj 34 estas iom ŝiritaj; sed la libro estas bone ilustrita de fotografaĵoj. La unua parto konsistas el priskribo de Antverpeno kaj ties ĉirkaŭaĵo, kaj utilaj sciigoj ĝis pago 175, kie komenciĝas listo de la organizintoj kaj partoprenintoj de la kongreso.

Inter ili mi trovis la nomojn konatajn de mi de D-ro Zamenhof, Rektoro E. Boirac, Generalo Hippolite Sebert, Carlo Bourlet, Henry Bolingbroke Mudie, Reĝo Albert de la Belgioj, Paul Blaise, George Douglas Buchanan, Prof. Theophile Cart, Gabriel Chavet, Paul Christaller, Harold Clegg, Friedrich Ellersiek, Helen Fryer, William

Harvey, Hector Hodler, Herbert Hôveler, Barono Felicien de Menil, Percy Merrick, Edward Alfred Milledge, D-ro Edmond Privat, Joseph Rhodes, Maurice Rollet de l'Isle, Rene de Saussure, J. Silbernik, John Warden.

Ankaŭ mi trovis la ĉi sekvajn, kiuj evidente estis membroj de la Nottingham Societo antaŭ la unua mondmilito:— Tom Bakewell, ŝtrumpvendisto, 150 Denman Street, Radford, John Berney, inĝeniero, 31 Stratford Road, West Bridgford, George Osborne Crawley, meĥanikisto, 53 Boden Street, Radford, Clifford Fox, komizo, 29 Cedar Road, Forest Fields, F-ino Alice Hamel, 14 Derby Grove, Lenton Sands, George Marvin, tajloro, 211 Ilkeston Road, kaj S-ino Marvin, Claude Meakin, oficisto, 53 Wimbourne Road, Radford, Thomas B. Rogers, konstruisto, 20 Cemetery Road, East Kirkby, F. G. Rowe, librotenisto, 51 Portland Road, E. Sipman, 18 Corporation Oaks, F-ino Florence Bird, 16 Lime Street, East Kirkby, F-ino Nelly Marriott, 81 Lossol Road, Carrington (ĉu Loscoe Road?) F-ino Maude Clarke, Linden Grove, Beeston, entute 14 homoj.

La listo estis de 1200 unuaj aliĝintoj. Interesis min ankaŭ la reklamoj:— ekzemple:— Roneo, Hotel St. Antoine (remeblita de Maple & Co., London), Hotel Metropole, Bruselo, Eliksiro Esperanto de L. Schumacher, Maison Liberty & Co, London, Vaporŝipoj "Wilford" de Antverpeno al la Tamizo, du ilustraĵoj de "Wilford 6", (Wilford estas vilaĝo apud Nottingham), Edgar Selens, (oni parolas kaj korespondas en Esperanto), monŝanĝisto, Amours Esperantistes, Vaudeville en un Acte, Fr. 0.95, Oscar Bergman, aŭtomobiloj, Bautzen kaj Berlin, La Turismo Cook, Vizitu Potsdam! Hotelo Bayerische Hof, Kolonjo, Libertempejo, Godesberg am Rheino, Viskio Esperanto, Pelikan, de Hannover kaj Vieno.

La libro estas absoluta minejo de interesajoj!

SPECIALA FLUGO

de
Sandra Slade

Eble unu el la plej gravaj eltrovaĵoj de la dudeka jarcento estas la sekreto de hompova flugo. Ĉi tiu rakonteto ne estas scienca traktaĵo pri flugmaŝinoj aŭ jetmotoroj; certe, mi ne havas la konon por veiki pri tiaj aferoj. Sed mi povas uzi mian imagon kaj verki novelon en kiu flugmaŝino ludas gravan rolon . . .

“Ni iru, Mateo, pli rapide! Tre plaĉas al mi esti ĉi tie kune kun vi, kun la suno rebrilanta sur la aloj kaj la nuboj moviĝantaj kaj ŝanĝiĝantaj ĉiufoje. Rigardu la bluan ĉielon – tiel profunda estas la koloro, ke en ĝin oni preskaŭ povas plonĝigi la manojn – tiel verda estas la horizonto, tranĉanta simile al tranĉilrando trans la kamparo. Rigardu tiujn ondformajn montetojn, kaj la kampojn kaj la bienojn kaj la vilaĝojn. Tio estas la arbaro de Ferdean -ni piknikis tie unufoje, ĉu vi memoras? Antaŭ multaj jaroj . . . simila al ludilo-urbo, ĉu ne, kun ĉiuj el tiuj malgrandaj konstruaĵoj kaj etaj aŭtoj sur la ŝoseoj, kaj miniaturaj homoj, kiuj rapide trovas tutfoje kiel demencaj formikoj sur flikita tuko. Mi opinias, ke ĉi tiu estas la sola loko en kiu homoj iam estas tute liberaj – mi volas diri, ke ili estas tute liberaj de ĉiu el la bagateloj de siaj ĉiutagaj vivoj. Tre plaĉas al mi, ke vi komencis piloti, vi ne scias kiel ĝi plaĉas al mi . . .

Ĉu vi povas vidi tiun fervojan ponton dekstren? Kial vi ne plonĝbombas sub la ponto, en la maniero en kiu vi faris tion kiam ni antaŭe venis flugi? Sentis nekredible, tenti Faton . . . Ho, vi estas mirinda piloto, vi neniam ankoraŭ havis akcidenton, estas nenio por timi. Ne estu tia malkuraĝulo, Mateo! Vi povas fari ĝin!

Vi scias, ke mi vere cagreniĝis kiam vi kaj Elizabeta supreniris per nia aeroplano. Mi ja scias, ke ĉi tiu sento estas malracia, sed vi iel malbonigis ion specialan. Mi ne povus pardoni vin. Kvank-

am mi pardonis vin por amaso da aferoj, ĉu ne, Mateo? Via amafero kun mia fratino sen mia kono dum multaj jaroj ekzemple. Kompreneble, mi iĝis la lasta personino eltrovi pri tio, mi aspektis esti vera stultulino. Mi ankaŭ pardonis vin kiam vi fraŭdis tiun monon de nia komerco. Mi supozas, ke vi elspezis la tutan monon aĉetante aĵojn por ŝi – tamen, mi ne plendas pri kelkaj pundoj, ni ĉiam vivis tre bone, ĉu ne? Por montri al vi kiel sankta mi estas, mi eĉ pardonos vin pro la fakto, ke vi murdis min kaj ŝutis min sur la forĵetejo – sed mi malamas esti humiligita. Vi devus scii tion, Mateo, vi vere devus scii . . . Nun ĉio estas ĝusta, flugu sub tiu ponto, tuj faru ĝin!

Ho, Mateo, kia domaĝo. Vi enfrakaŝiĝis al la ponto, ĉu ne? Vi frakasis nian belan aeroplanon en centojn da malgrandaj, etaj pecoj. Oni povas vidi la fumon kaj flamojn tra mejloj. Sed nun estas tro malfrue. Tamen, vi ne vere kredis, ke mi permesus vin forlasi min, ĉu? Nun vi devas resti kun mi dum eterneco, eterneco, Mateo, eterneco . . .

AL NOVNASKITA NEPINETO

Etulino, etulino,

Ave mi salutas,

Kaj ĉe pordo de l' destino

Amon al vi ŝutas.

Trans la pord' atendas ĉio,

Plena korb' de emocio:

Pasŭ vi kun energio,

Ja la vivo krutas!

Sed survoje al la alto,

Dum la granda peno

Vin subtenu korekzalto,

Ne malhelpu spleno.

En mallum' ne kaŭru honte!

Spertu vigle kaj volonte,

Iru al la ĝoj' renkonte,

Brava laŭ sinteno!

Ĉiutaga Esperanto

PRI MURDO KAJ ALIAJ ARTOJ

“Ĉu vi dormis post la murdo?”

“La murdo?”

“Ĉu vi ĝuis la unuan prezenton (*première*) de la teatraĵo hieraŭ?”

“Ha! Jes. Treege. La ĉefrolulo (*hero*) estis brila, sed ne sole li; la tuta trupo (*company*) lin bone subtenis. Mi aludas al Ĝon Halam.”

“Vi vere estas falokrato (*male chauvinist*)! Vi ne menciis la ĉefrolulinon.”

“Ne estis. Ĉiu vere orbitis ĉirkaŭ la detektivo. Mia edzino plendis, sed estis pli da bonaj roloj por la virinoj ol por la viroj.”

“La ĵurnalaj recenzistoj ĝin tre laŭdis. Evidente la dekoracioj (*sets*) estis spektaklaj, sed laŭ mia ĵurnalo estis problemo ĉe unu el la rekvizitoj (*props*). Kio okazis?”

“Elektra kandelo misfunkciis, kio iom stumbligis junan aktoron ludantan la rolon de servisto. Li ne povis ne (*couldn't help*) subridi, sed tuj bridis sin. Verŝajne li debutis, kaj suferis de la streĉiteco.”

“Mi devos ĝin vidi. Sendube mi lernos ion pri la aktorarto. Ĉu vi scias, ke precize hodiaŭ mi estas en la amatora trupo de mia kompanio jam de kvin jaroj? Laŭdire tiu Halam brile altempiĝas siajn paroladojn por maksimuma efiko.”

“Vi pravas. Eĉ la plej banalaj (*commonplace*) esprimoj iĝis en lia buŝo atentigaj. Kaŝita minaco trarompis plurfoje; li timigis la spektantaron.”

“Vi blagas (*are joking*)!”

“Ne absolute.”

“Ĉu vi havis bonan sidlokon?”

“En la unua balkono (*dress circle*), en la antaŭa vico – preskaŭ en la centro. Mia edzino estis ekzaltita (*over the moon*).”

“Kia bonŝanco!”

“Prosperis al mi (*I had the good fortune*) havi aferojn en la teatro antaŭ

pluraj monatoj, kaj kiam mi menciis mian intencon ĉeesti la unuan prezenton, la administristo (*theatre manager*) – kiun mi bone konas – rezervis por mi du lokojn. Sed tio restu konfidenca; alie tio povus embarasi lin.”

“Do, aranĝo post la kulisoj (*behind the scenes*)!”

“Aĉa ŝerco!”

“Pro mia envio. Kiel la spektantaro reagis?”

“Entuziasmege. Ili starante ovaciis (*gave a standing ovation to*) la tutan trupon, kaj revokis ĝin kvinfoje (*there were five curtain-calls*).

“Ĉu vere KVINfoje?”

“Eĉ poste, la aplaŭdado daŭris, sed evidente la trupo decidis, ke kvin revokoj sufiĉas.”

“La recenzisto menciis la lumefektojn (*lighting effects*).”

“Jes; sed mi nenion diros, ĉar se mi diros ion, mi difektos vian plezuron. Ili estas esenca parto de la tuto.”

“Mi ne povos pacience atendi. Mi ĉeestigos mian edzinon. Vere, ŝi preferas idiliaĉajn (*sloppy*) teatraĵojn, kie la geamantoj enamiĝas en la unua akto, kaj geedziĝas en la lasta. Kiel mi diris al ŝi, la geedziĝa ceremonio nepre estas la lasta afero. Post tio, ne plu estos idilio!”

“Mirakle estas, se vi tiel diras, ke ne jam okazis murdo en via domo. En tiu dramo vi certe havus la ĉefan rolon. Estus domaĝe, ĉar vi ne povus ĝui ĝin.”

Don Lord

LAŬ MIA OPINIO . . .

Seksismo

Mi sekvas interesiĝe la debaton pri seksismo en Esperanto. Mi legas en miaj instrulibroĵoj ke kiel ‘kantbirdo’ estas speco de birdo (kanta birdo), tiel ‘hundino’ estas speco de ino (hunda ino). Do ‘virhundo’ estas ‘vira hundo’ (angle: a male dog) kaj ‘virino’ estas ‘vira ino’ (angle: a male female). Ĉi tiu estas nelogika kaj memkontraŭdira. Sendube ‘vir-’ ne estas oficiala prefikso

kaj, kiel Haku-mo' olelo-mehameha diris, ĝi estas dubasenca: 'virhundo' povus signifi specon de luphomo aŭ alia monstro. 'Hundo' (sen la sufikso '-in') povus esti 'virsekxa hundo' aŭ 'hundo virsekxa aŭ ina'. Ĉi tiu ankaŭ estas dubasenca.

La vorto 'sinjorino' devus esti la ina ekvivalento de 'sinjoro', t.e. virino edzina aŭ needzina, sed tiu ne estas. Ĉi tiu estas neregula kaj aparta uzo de la sufikso '-in'.

Mi ankaŭ legas ke oni ne permesas ke mi uzu la vorton 'gepatro' ĉar oni povas uzi la prefikson 'ge-' nur por la pluralo (gepatroj), do ne estas Esperanta vorto por la angla 'parent'. Ĉi tiu ŝajnas esti senutila kaj arbitra regulo, ĉar 'gepatro' povas havi ne alian signifon. Pro ĉi tiu tuta, Esperanto ŝajnas iom malfacila.

Sed – kio ĉi estas? Esperanta gramatiko: nelogika, dubasenca, neregula, senutila kaj arbitra, malfacila? Evidente, pri la temo de sekso, la simpla, logika kaj regula gramatiko de Esperanto estas perversigita de la deknaua-jarcenta sinteno pri sekso, sinteno kiun Esperanto heredas. Ineco estas rigardata kvazaŭ ĝi estas strangaĵo en vira mondo. Ĉar Esperanto rifuzas trakti la seksojn egale, ĝi trafas strukturajn malfacilaĵojn.

Esperanto bezonas sufikson por indiki virseksecon kiel '-in' indikas inĉecon. Mi povus akcepti la sugeston '-iv' de Sally Phillips. Ĝi jam estas neoficiala sufikso sed ĝi estas uzata malofte kaj verŝajne estus ne konfuzo. Sed eble '-uv' estus pli bona (kaj malpli konfuziva?)

Estas grave ke la signifoj de estantaj vortoj ne ŝanĝiĝu. Ni devas ne reskribi la regulojn kiam ni havas preskaŭ cent jarojn de literaturo malantaŭ ni. Tamen, ne estos necese ke ni ŝanĝu estantajn signifojn. Ni nur devas enkonduki la novan sufikson.

Mi supozas ke la maljunuloj ne uzos ĝin (kaj multaj Esperantistoj estas iom maljunaj.) Ja ili eble oponos ĝin. Ne gravas. Maljunuloj ĉiam estas lingvaj

konservativuloj, sed la lingvo de ilia generacio mortas kun ili, kaj la parolado de la junuloj maljuniĝas. Tiel estas kiel lingvoj evoluas kaj kiel Zamenhof antaŭvidis la evoluadon de Esperanto.

La vorto 'instruisto' estas nun dubasenca. Ĝi povas esti 'vira instruisto' aŭ 'instruisto virsekxa aŭ ina', speciale kiam ĝi estas uzata de parolantoj kies gepatra lingvo ne faras distingon. Se la vorto 'instruistuvo' iĝus pliofte uzata, la dusenceco malpliĝus, kaj 'instruisto' emus signifi instruiston virsekšan aŭ inan. Tamen, eta dusenceco restus. Do, en la 21a jarcento, homoj legos la Esperanton de la 20a jarcento kaj komprenos ke la dusenceco estis pli forta pasinte.

Eble 'viro' povus akiri la signifon de 'homo', sed mi opinias ke ĉi tiu estas neverŝajna. 'Viro' estas tro forte asociita kun 'virsekso'. La kreado de la vortoj 'homino' kaj 'homuvo' estas pli verŝajna. Eble la nelogika duopo 'viro' kaj 'virino' povus iĝi tute neuzata. Ĉi tiu estas ideo kiu eble ŝokas multajn homojn, sed ĉiuj vivantaj lingvoj ŝanĝiĝas multe dum cent jaroj – la lingvoj kiuj ne ŝanĝiĝas estas mortintaj lingvoj.

David Vesty

Antaŭ dek jaroj, junaj usonanoj proponis la sufikson "-ab" (el la hebrea?) por indiki la virsekson. Laŭ mia scio, ĝi estas preskaŭ neuzita. Mi mem en poemo ŝerce nomis min "Cindrulabo": vira formo de "Cindrulino". – Red.

Samideaneco

Ĉu iu povas diri al mi kio estas Esperantomovado? Kaj ĉu ĝi estas Internacia aŭ Nacia?

Kiam ni komencis lerni Esperanton, antaŭ tri jaroj, kaj ni aliĝis al E.A.B. la asocio sendis al ni multajn paperojn kiuj klarigis la valoron de la Internacia Lingvo, 'amikeco', 'paco', 'informoj' ktp.

Tiam, mi kredis, ke mi komprenis ĉion, sed nun mi dubas pro pluraj

kialoj. Ĉu Internacia Lingvo volas diri, ke ĝi estas bona nur por ferii alilande kaj paroli kun alilandanoj? Mi ne scias; sed mi opinias, ke por la plejparto de la angla popolo, jes.

Mi loĝas en Anglujo de antaŭ dudekkvin jaroj, kaj ankoraŭ nek sen Esperanto nek kun Esperanto mi estas tute akceptita.

Nia grupeto formiĝis per tri personoj; du virinoj kaj unu viro, mi estas unu el ili. Ĉe la komenco, kiam ne estis sufiĉe da personoj ili bonvenigis min. Tiam mia akcepto estis afabla; mi laboris tiom multe kiom eble. Poste la grupeto kreskis iomete, kaj tiuj kiuj aliĝis la lastaj nun estas la unuaj. Nun estas sufiĉe da personoj; de tempo al tempo estas renkontiĝo kaj mono miksiĝas, do mi ne plu estas besonata, ne informata. Nun mi estas sentaŭga. Kompreneble mono ne havas amikojn. Sed estas proverbo kiu diras: 'Se vi estas sincera, kial vi dubas pri la aliaj?'

Mi opinias, ke en ĉiuj cirkonstancoj Esperanto ne povas sukcesi; ne estas amikeco. La movado ne devu esti persona aŭ nacia celo, ĉar en tiu kazo neniam ĝi estos universale akceptita. Kial iu ajn kredas ke la Movado, eĉ Paco, povas sukcesi se estas tiom da arogantaj homoj en la mondo?

V. E. Hernando

Holidays

I have recently taken over the organisation of Esperanto Holidays Association from Eric Walker and this organisation is now known as 'Esperantotur' (Britio). I look forward to the continued support of your readers and wonder if any of them would be interested in a trip to Poland for 8 or 9 days at an approximate cost of £200. This trip could be for Esperantists of all levels, to participate on courses which are organised at the Konstanta Internacia Lernejo in Bydgoszcz. The journey to Poland could be by plane and train or hovercraft and mini-bus. If any of your

readers would like to suggest to me where they would like to go for a Esperanto Holiday perhaps they would care to write or phone me with their suggestions.

John Dickinson

Esperanto Domo
4 Casaba Terrace,
Llanfoist, Abergavenny,
Gwent NP7 9NR.
Tel. (0873) 2731

VETERANA ESPERANTISTA KLUBO

Depost mia peto en BE Marto/Aprilo, mi ricevis 26 respondojn de Esperantistoj, kiuj volis registri sin en VEK.

Kontentiga komenco! – ni venkis la inertecon; ni nun uzu la akiritan momentumon, kiun ni jam generis, por starigi vere indan reprezentan Britan Sekcion.

VEK ne estas speco de geriatra rondo – ĝi celas prepari honorliston de tiuj, pri kiuj Grabowski pensis kiam li aludis al "lia anaro, de plej frua hor", fidela al li ĝis la ĉerko."

Vi apartenas al la veraj pioniroj, kiuj sekvis la alvokon de Dr. Zamenhof – "Nur rekte, kuraĝe, kaj ne flankiĝante, ni iru la vojon celitan" – jes, vi estas "provita, hardita, al cel' unu fojon signita".

Do mi bezonas vin! – mi eĥu la bonkonatajn vortojn

"Vi en la urbo, vi en urbeto,
En la malgranda vilaĝo,

Kie vi estas, kion vi faras,
Ho karaj fratoj vi miaj?"

Faru ĝin nun! Sendu vian titolon, nomon, adreson, naskiĝjaron, jaron en kiu vi komencis lerni Esperanton, mallongan raporton pri via Esperanto-vivo, kaj malgrandan foton – ĉiuj al mi ĉe:– 74 Dales View Road, Ipswich, Suffolk IP1 4HL.

Anticipe, mi kore dankas!

Veteranoj! – VEK-iĝu!!

JACK HEATH
Brita Repr. VEK.

NEKROLOGOJ

R. F. Parker

Mi malĝojegis aŭdi telefone de lia edzino Muriel, ke S-ro Reginald ('Reg') Parker mortis la 24an de februaro, en la ago de 82. Pri lia esperantista vivo mi scias iom, kvankam li tiel agemis precipe antaŭ kaj dum la milito, sed ne multe poste, kaj mi unue renkontis lin nur je 1956. Tiam, li estis modernlingva fakestro ĉe Orange Hill School, Burnt Oak, Middlesex, kie mi komencis kiel instruisto, kaj ni amikiĝis. En tiu tempo li sciigis min, ke li estas (aŭ estas estinta!) Esperantisto, sed same kiel la plejparto de nesciantoj, mi rideteme ne interesiĝis!

Multe da jaroj poste, post sia emeritiĝeco, li denove milde provis interesi min pri Esperanto (li sciis, ke pri lingvoj ĝenerale mi ĉiam interesiĝas) per donaco de gramatika libro kaj vortaro. La du libroj restis nemalfermitaj dum tri jaroj, ĝis la tempo, je 1983, kiam mi enlite malsanis kaj, de scivoletajo kaj konscienco, eklegis paĝon 1 de la gramatiko. Sekvis rapide paĝo 2, paĝo 3, paĝo 4... la tuta libro; mi estis kaptita!

Kompreneble, Reg tre kontentiĝis pri tio, kaj poste pludonacis al mi la rakontolibron "La Virineto en Bluo", la vortarojn Rhodes (A-E) kaj Millidge (E-A), malnovajn ekzemplerojn de "Lingvaj Respondoj" kaj "Fundamenta Krestomatio", kaj unu-du aliajn libretojn. Mi estis lanĉita! Post tiam, li ankaŭ diris al mi iom pri siaj antaŭaj esperantistaj agadoj; la B.E.A. donis al li, kiel delegito de Edgware, £10 (pundojn sterlingajn) por ebligi lin ĉeesti la Cseh lernejon ĉe Arnhem je 1938; li kunveturis kun grupo el siaj lernantoj al Nederlando je 1939, kaj iĝis oficiala instruisto de Esperanto dum la milito.

Post tio, eble li tro okupiĝis alie, aŭ eble senkuraĝiĝis. En lastatempa latero, li skribis (Esperante) nur duonhumore, "Post ĉiuj miaj klopodoj vi estas mia nura disĉiplo! Ho ve! Mi demandas min ĉu tiu unu sukceso pravigas tiujn 10

pundojn el la B.E.A. je 1938!" Li ankaŭ skribis pri lastatempa, kurioza afereto, kiam iu homo, alveninte por fari demandojn pri apuda malplena vendota domo, subite kaj neatendite parolsaltis en la francan lingvon, sek-vante en la germanan, kaj fine en Esperanton! La homo tre surpriziĝis, ke Reg povis respondi en ĉiuj tri lingvoj, sed malgraŭ la ebleco, ke li havus esperantistan najbaron, li neniam reaperis.

Nun ni ĉiuj perdis la eblecon, ke Reg povus esti najbaro, kaj ni tre malĝojas.

D. B. Kershaw

Kun granda bedaŭro ni informas pri la morto de S-ino Ethel Lewin de Dunstable, 95-jara. Ŝi estis la vidvino de Maurice Lewin, kiu lernis Esperanton en Pollando kaj poste fondis la Veteranan Esperantistan Klubon por kunligi tiujn, kiuj restis fidelaj al Esperanto dum pli ol 40 jaroj. Ges. Lewin kelkfoje tre bonkore gastigis la Sud-mezlandan Federacion por somera konferenco en siaj hejmo kaj ĝardeno kaj ilia filo fariĝis bone konata Esperantisto kaj mar-biologisto en Kalifornio. S-ino Lewin restis en kontakto kun la movado pere de SMEF kaj pli nova Esperantistino en Dunstable, kiu raportis al ni, kiel S-ino Lewin eliris por sia kutima prom-enado la 11an de Aprilo kaj veninte hejmen, sidigiĝis kaj kviete forpasis.

Sybil V. Sly

Mortis la 16an majo 1986 Charles Gregory Woods (1903-1986) el Derby. Li estis distrikta ĉefkolorigisto por Derbyshire graflanda konsilantaro ĝis li emeritiĝis 1968, kiam li edziĝis kun Joan Elliott. Dum la Dua Mondmilito li servis kiel brulestingisto en Birmingham. Post sia edziĝo, li aliĝis al la Esperanto-movado, kaj estis membro de EAB kaj UEA. Kun la edzino li vizitis amikojn en Norvegujo, Danujo kaj Nederlando, kaj ĉeestis kongreson en Finnlando. Funebra diservo okazis en la preĝejo de Sta Nikolao en Alles-

tree la 21an de majo. Ĉeestis anoj de la Esperanto-grupoj en Derby kaj Nottingham, kaj multaj aliaj amikoj el la Derby-distrikto.

Harold Fillingham

El PUNCH April 23 1986

A letter headed "Esperanto-Asocio de Irlando" – from an extraordinary woman in Dublin called Maire Mullarney, a splendid person who breast-fed and educated all her own masses of children and whose son is now in the Boomtown Rats. Which was part of the point of the letter, because Maire Mullarney has also written to Bob Geldof suggesting that if he were to give his support by singing even one song in Esperanto he would be helping the Third World to talk back. She also drew my attention to the fact that there are 174 MPs in the Esperanto Parliamentary Group, which can only be a good thing given that so few of them understand what they are talking about in the first place, and that the President of the British Esperanto Association is a Dublin woman, and that the phrase "publisher-needing-to-be-impressed" could be said in just one Esperanto word. Must be the reason why Shaw bequeathed to it, although next year's centenary celebrants ought to remember that the language got its name from the founder, Dr Zamenhof's pen-name – meaning "the Hoping One". And furthermore – he was an oculist.

Frank Delaney

NOVAJ LIBROJ

Lingvaj aspektoj de Esperanto, de Bruno Migliorini. Edistudio, Pisa, 1985. 96p. bind. Prezo 24 nl.gld.

Migliorini estis fama lingvistikisto kaj ankaŭ aktiva esperantisto – kombino bedaŭrinde ne tre ofta. Omage al lia memoro, oni eldonis ĉi tiujn sep eseojn,

el kiuj ses datiĝas de pli ol duonjarcento: ĉu tio signifas, ke la materialo ne plu aktualas? Ne. Malgraŭ tio, ke ni hodiaŭ nenion aŭdas pri Interlingua kaj Occidental (kiuj motivis lian reason en du eseoj), la ideoj de Migliorini estas hodiaŭ freŝaj kaj stimulaĵoj – parte ĉar ili restas freŝaj kaj nesuperitaj. Efektive, mi plej frandis "La akcenton en Esperanto kaj en Occidental", en kiu la aŭtoro klare montras la miopecon de tiuj, kiuj celas "naturigi" la "artefaritaĵojn" karakterizojn de Esperanto. Tri eseoj estas etimologiaj, kaj laŭ mia scio ne ekzistas similaj en nia literaturo. Entute mi opinias, ke la libron ĝuos tiuj, kiuj kutime interesiĝas pri lingvoj kaj interlingvistiko.

W. Auld

Sep Vangofrapoj, Károly Aszlányi. El la hungara tradukis László Somlai. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio. 148 paĝoj.

Mi unue legis ĉi tiun libron kiam ni estas lernantaj la lingvon kaj trovis ĝin facila por legi kaj amuza. Mi relegis ĝin denove por ĉi tiu recenzo kaj mi ankoraŭ konsentas kun miaj sentoj post la unua legado. La verko rakontas la aventurojn de juna inĝeniero sen laboro, Tenson MacPhab (literumado de la nomo laŭ la libro!) kiu promesis vangofrapi sep fojojn al riĉa ŝtalreĝo Astor Terbanks, kiam li rifuzis al MacPhab la sep pundojn kiujn li petis por pagi la ludon de sia loĝejo. Mi ne klarigos la intrigon! La lingva stilo estas klara kaj simpla, sed tio ne signifas malbona, leganto ne bezonos uzi la vortaron PIV por trovi la signifon de iu ajn vorto en la verko. Laŭ la antaŭparolo la aŭtoro konis la anglan lingvon sed la kono pri lokoj kaj kutimoj britaj ne estis tre bona! Gretna Green estas pli malproksima de Londono ol evidentiĝas en la libro. Estas ankaŭ pluraj aliaj detaletoj ne britecaj kaj lokoj kiuj ne akordiĝas kun la realeco, sed mi ne

volas rikani pri ĉi tiuj eroj. Kiam la legonto finos la romanon li/ŝi trovos sep paĝojn reklamantaj librojn eldonitaj antaŭ 1943 far de E.P.C., nun preskaŭ ne akireblajn pro elĉerpiĝo. Do, mi resumos: jen libro facile legebla sen lingvaj jonglaĵoj. Bedaŭrinde la malforta bindado de mia libro lasis min, post la legado, kun fasko da paperfolioj! Kaj kial oni ne forigis la ne plu aktualan noton en paĝo 12?

Amador Díaz

La tuta Esperanto. Gramatiko por progresintoj, gvidilo por kursestroj. Henrik Seppik. Tria eldono. 19 x 14 cm, 184 p. Hungara Esperanto-Asocio 1984.

Se vi estas progresanto kaj hezitas aĉeti Plena analiza gramatiko, ĉu pro trokosto, ĉu pro la timinde granda enhavo, prenu La tuta Esperanto por vere plezura esploro tra nia lingvo. La libron eldonis unue Literatura Mondo en 1938 kaj jen estas jam la dua reeldono: mem signo pri ĝia populareco. La lingvo estas instruata laŭ klara ordo – kio faras la libron ankaŭ facila konsultilo – kaj tamen neniel ŝablone sed male freŝe kaj interese sur ĉiu paĝo. La estona aŭtoro estis ja Ĉe-instruisto, kiu multe vojaĝis instruante en diversaj landoj kaj lia kono de homa lerno animas la verkon. Al la ĉapitroj estas aldonitaj spritaj ekzercoj en formo de anekdotoj kie mankas vortfiniĝoj aŭ prepozicioj aŭ interpunkcio, kiujn oni devas enmeti. Sufiĉas citi unu ekzemplon sur p. 77, Kiel Kolumbo eltrovis Amerikon, kie oni devas “alskribi la mankantajn sufiksojn kaj mallongigi la diklitere presitajn esprimojn.” Jen la fino (kun la instrukcioj plenumitaj):

“Kolumbo . . . la unuan fojon starigis siajn piedojn sur Amerika tero. Li proksimiĝis al la indianoj kaj demandis ilin: “Ĉu vi estas indianoj?” Kaj la indianoj respondis: “Jes, ni estas indianoj. Sed ĉu vi estas Kolumbo?”

Ricevinte jesan respondon, la indi-

anoj paliĝis kaj ekkriis: “Ho ve, nun ni estas eltrovitaj!”

R. Rossetti

Febro, István Nemere, Originala romano. Hungara Esperanto-Asocio. 131 paĝoj.

Kiam mi recenzis la libron “La Monto” de la sama aŭtoro, mi diris ke se tiu libro estis lia unua romano, mi avide atendis la duan. Per piednoto la Redaktoro avertis min ke Nemere jam verkis kvin pluajn romanojn, kaj eble por bonigi mian scion pri ĉi tiu verkisto, li sendis al mi la nun recenzatan volumon! Laŭ la listo de libroj far Nemere presita sur la lasta paĝo, “Febro” aperis antaŭ “La Monto”. La nuna romano havas kiel protagoniston la verkiston, kiu rakontas la amon sian por Anna. Li, la amatino Anna kaj la inĝeniero, edzo de Anna, estas la solaj rolantoj en la verko, kaj eĉ la inĝeniero ne aperas ofte. La bonan prozon oni plezure kaj glate legas. Nemere montras, denove, kiel bone li regas la lingvon, alimaniere li ne povus rakonti al ni la pasion kaj amon, kiujn obsede li sentas pri la amatino, dum pli ol cent paĝoj sen iu ajn priskribo de lokoj aŭ homoj por farĉi la rakonton. De la komenco ĝis la fino ni legas la vortojn skribitajn de tiu obseda amanto, ofte arangitajn en fasketoj kiuj sonas kiel profundaj filozofiaj komentoj sed post relego kaj enpenetro de la belvortaj ŝeloj oni trovas kernon ŝrumpitan kaj sekan aŭ eĉ tute ne ekzistantan. La mistero de la romano persistas ĝis la fino. Jes estas mistero-romano! La deziro legi plu kaj plu estas tre granda kaj la impeto donita de la fluantaj vortoj malhelpas lasi la libron ĝis la posta tago. Tamen la karaktero de la protagonisto neniam sukcesis akiri mian simpation kaj pro tio mi ne malfacile haltis la legadon. Anna, nedetale priskribita, povus esti kiel moderna Beatrica aŭ Dulcinea, sed ŝi estas karesata kaj ne restas nur kiel adorobjekto en la menso de la amanto! Preskaŭ je la

fino de la libro la aŭtoro skribas: "Ni pilkludas per la vortoj, gustumas novecajn frazojn. Ni perdiĝas en la pseŭdoagado." Ĉi tiuj vortoj donas la plej taŭgan resumon pri la verko. La vortaj ludoj tedos iujn legantojn, sed deziro por solvi la misteron povas konservi la intereson de multaj ĝis la fino.

Amador Díaz

Skizo pri Personeco de Esperantisto de Tyburcjucz Tyblewski Eld. "Ritmo" Varsovio 1985 67p. 20 cm. broŝ

La verko portas sur sia unua paĝo la vortojn "Internacia Scienca Asocio Esperantista", kaj subtitoliĝas "Skizo pri personeco de Esperantisto (pri ĝia eventuala evoluo)". Ĝi enhavas bibliografion plurlingvan de 73 eroj. La aŭtoro estas doktoro de humanismaj sciencoj, kaj socipsikologiisto.

En kontrasto kun multe da aliaj libroj, la verkinto invitas la leganton fari teston pri si por identigi sian psikologian specon, laŭ kvar homaj tipoj, kaj poste laŭ ses ĉefaj valoroj, kiuj estas gravaj por la leganto. Li insistas, ke oni tion faru por kompreni lian verkon.

Post tio, li prezentas glosaron de utilaj nocioj (personeco, sinteno, afekcio, ktp.), kiujn li aludas tra la tuta verko.

Tiel demetinte la fundamenton, li traktas la konsisterojn de personeco, kaj metas la "mi" en la mondon.

En serio de ĉapitroj li disvolvas sian temon: interpersona kontakto, komunikado, afekcioj, antaŭjuĝoj, valorsistemo, interetnismo, ktp, ĝis *Esperanto — la efektiva ŝanco por evoluigi individuon*.

D-ro Tyblewski volas liberigi la leganton de la katenoj de egocentrecio kaj irigi lin en la ni-econ de rilatoj internaciaj kaj vere TUTHomare interhomaj. La celo de la libro estas ne informa sed re-forma, ne priskriba sed evoluiga. Komencinte sur bazo ortodokse psikologia, li gvidas la leganton en la konscion almenaŭ de la homarane-

co, kaj eble de la homaranismo. Konstatante la malfacilon eligi la leganton el la kadroj de mi-centraj perceptoj, la aŭtoro helpas lin analizi siajn fortojn kaj malfortojn, kaj montras al li kiel transsalti la barojn de la raso, de la haŭtkoloro, de la politiko, kaj de la religio.

Socipsikologio estas, evidente, la studo sole pri sociaj rilatoj rigardataj de psikologia vidpunkto. La framo, sur kiun konstruas psikologiajn analizojn, certe ne estas identa kun tiu de la adeptoj de la religio (inkluzive de la Budhismo.) Ĉi ties baza koncepto estas ne la interhomeco, sed la transcendo. Ke la analizoj de socipsikologiistoj povas klarigi la agadon de ja enkorpa transcendemuloj estas vero; sed finfine oni aŭ rigardas la transcendan aspekton de la vivo kiel realaĵon, aŭ ne. Meza punkto ne eblas. Socipsikologia analizo ĝuste analizas eĉ religiajn rilatojn kiel specojn de interhomaj rilatoj; sed ĉar por iaspeca religiemulo la socipsikologia analizo traktas nur parton de la homa psiko, ĝi ne povas esti por tia homo tute kontentiga. Jen unu praktika malforto de ĉiuj analizoj, kiuj traktas la religion kiel nure psikologian fenomenon: ĉu la socipsikologia starpunkto estus prava aŭ ne, ĝi ne povus esti *universale* kontentiga. (Tamen, en ĉiu grava religio de la mondo oni instruas pri interhoma amo, kaj Tyblewski helpas la religieman homon forigi blindigajn barojn, kaj malkaŝi siajn nerekonatajn antaŭjuĝojn.)

La libro povas esti valorega por ĉiu Esperantisto ĝuste pro tio, ke ĝi donas okazon uzi ĝin — kiel diras la aŭtoro — kiel *spegulon*. Ĝi ebligas konsideron de preskaŭ ĉiu interhoma koncepto, kiun oni povas havi en la menso. Ĝi ne sole pensigas kaj sentigas, sed ankaŭ ĝi ekzercas la leganton pri plua kreskado psike kaj sentive. Ĝi estas do vera *laborilo* en la evoluigado de la esperantisma/samideana konscio.

D-ro Tyblewski pli pakas en sian broŝuron ol multe da "esperantologoj"

kaj esperantopropagandistoj metas en pli grandajn librojn. La ilustraĵoj anekdotoj estas spritaj kaj trafaj. (Evidente, la aŭtoro percepte rigardas kongresantojn!) Ja valoro kontribuo al la teorio kaj la praktiko de la movado. Lia semado donu riĉan rikolton!

Don Lord

PLUVO

Tuttago pluvis;
Kaj la laŭtaj malfrusomeraj ventoj
Lamentas kiel krientaj infanoj.

Tuttago pluvis;
Kvazaŭ la larmoj de la malsata popolo
Neniam ĉesos bati je mia fenestro.

Tuttago pluvis;
Malhelaj gutetoj pulsas konstantan
tamburbaton.
La ĉielo ne povas retenigi sian ploradon.

Nur la birdoj restas silentaj.

Kiel mortintaj infanoj.

Tuttago pluvis.

Sandra Slade

VOLAS KORESPONDI:

S-ro Tu Ĉi-gŭo, Labour Insurance Products Factory, Leshan City, Sichuan Province, Ĉinio, laboristo 23-jara kiu iomete scipovas la anglan kaj la japanan kaj ĵus fariĝis instruisto de Esperanto, volas korespondi por levi sian nivelon de legado kaj teknikon de tradukado, sopiras al akiro de kelkaj klasikaj verkoj en Esperanto.

Rubeb Casingena, 85 Guze' D'amato Street, Paola, Malta 11-jara knabo lernas Esperanton en la lernejo. Kolektas glumarkojn kaj Esperantaĵojn, volas korespondi kun britaj geknaboj pri ĉiujtemoj.

Mohammad Reza Saiedy, Store Saiedy, Veresk-Mazandran, IRAN komencanto volas havi helpon en la lernado.

Gaelano Marra, Klaso V, Scuole Elementari di Stato, Ghiffa 28055, cap, Italujo, lernas Esperanton en la lernejo, (via Alla Rende) volas korespondi kun geknaboj.

Krzysztof MAKSYMOWICZ, Ks. Brzoski 36, m.2, 91-315 LODZ, Pollando 39-jara kuracisto-kirurgo, edzino kun tri filinoj kaj edzo eklernis en Novembro, '85 kaj volas korespondi por perfektigi.

DISKOKOLEKTANTO bonvenigus ge-interŝanĝantojn el ĉiuj diskeldonaj landoj por pliriĉigi siajn laŭtemajn kaj laŭlandajn kolektaĵojn el sonrevojoj, sonbildkartoj, diskoj: interalie bildodiskoj, poŝtmarkdiskoj, himnodiskoj, interlingvo –(ĉefe Esperanto-) diskaj. Scipovas korespondi hungare, Esperante, ruse, ide, angle. George Csüllög, Budapest, Pf 189, H-1502.

Eva Nollova, Ohradni 1353, 14000 Praha 4 – Michle, Ĉeĥoslovakio 29-jara kolektas bildkartojn pri artistoj, kantistoj, g-diskoj, interesiĝas pri filmo, teatro, muziko, sporto, naturo, vojaĝo. Korespondas ĉeĥe, ruse, hungare, germane, Esperante.

Ldeněk Kolensky, Dlazdĕna 954, 26801 Hořovice, CSSR, 30-jara kolektas p.m., b.k., monerojn, interesiĝas pri filmoj, kulturo, muziko, sporto, precipe yogo, korespondas Esperante.

ANONCETOJ

5p por ĉiu vorto. Minimume 20 vortoj. Antaŭpagenda.

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

(SAT) celas instigi homojn per Esperanto al racia pensado por faciligi rilatojn inter la laboristoj de la mondo. Informiĝu ĉe: SAT en Britio, 29 Farrance Rd, Romford, Essex RM6 6EB.

Loughborough University. Courses in Esperanto at intermediate and advanced levels are once again included in the Summer Programme from 27 July – 2 August. Tutors: Don Lord & Stephen Thompson. Write for a brochure to The Centre for Extension Studies, University of Technology, Loughborough, Leics. LE11 3TU.

Practical Esperanto. 19-21st September 1986. Knuston Hall, Irchester, Wellingborough, Northants. Tutors: Don Lord, Allan Nutton, Stephen Thompson. Book early for

this increasingly popular weekend! Forms and information from the *Principal*, Knuston Hall.

“**La Migranto**”, riĉe ilustrita revuo pri turismo, naturbelajoj, flaŭro kaj faŭno, ekologio, naturprotektado kaj kulturaj aferoj, estas eldonata de la Esperanto-Fako de Turista Asocio “La Naturamikoj” (TANEF). Ĝi aperas kvaronjare kaj kostas nur 7.00 svisajn frankojn. Petu senpagan provekzempleron de: Liesel Nagel, Roseg-str. 17, D-7800 Freiburg, F. R. Germanio.

You could set up a Special Memorial Fund within the Norwich Jubilee Esperanto Foundation which would provide the gift of a Book or a Travelsip and thus provide a permanent Memorial to yourself, your dear one, or your great friend. Particulars from: Dr. K. M. Hall, 37 Granville Court, Cheney Lane, OXFORD, OX3 0HS.

University of Manchester
Dept. of Extra-Mural Studies, M13 9PL (Tel. 061-273 3333)

PRELEGOJ KAJ SEMINARIOJ EN ESPERANTO 1986

en Holly Royde, Manĉestro

prelegos Alan Nutton, Victor Sadler (antaŭvideble) kaj John Wells

24 – 26 oktobro 1986

ESEA KONKURSO

“Laboro en la dudekunia jarcento el la vidpunkto de laboristo”

Per esperant-lingva eseo de ne pli ol 3,000 vortoj pri la supra temo vi povas gajni SENPAGAN PARTOPRENON, inkluzive de veturkostoj laŭ SATEB bontrovo, en KONGRESO de SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (SAT) okazonta en Eŭropo.

Rajtas konkursi esperantistoj, kiuj loĝas en la Britaj Insuloj.

LIMDATO por ricevo de eseoj (prefere tajpitaj!) estas la **30a de Novembro, 1986**.

Kunsendu vian nomon kaj adreson. Ĉiu konkursanto ricevos informon pri la rezulto.

Alec Venture en kunlaboro kun Wim Prent prijuĝos la konkursajojn.

WORKERS ESPERANTO MOVEMENT (SAT en BRITIO) prezentas ĉi tiun premion honore al la JUBILEA JARO 1987. SATEB rezervas la rajton presigi la premiitan eseon.

Sendu viajn eseojn al: SATEB, 29 Farrance Rd, Romford, Essex RM6 6EB.